SAVEZ ZA ESPERANTO BOSNE I HERCEGOVINE
ESPERANTO-LIGO DE BOSNIO KAJ HERCEGOVINO

BA - 71000 SARAJEVO, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), Bosna i Hercegovina

Sarajevo, 2010 04 21

Informo por publikigo kaj diskonigo

BOSNIAJ ESPERANTISTOJ POR JUBILEO EN PROPRA DOMO

Manko de propra kunvenejo, la plej grava problemo kiun frontas esperantistoj de Sarajevo kaj ĝenerale de Bosnio-Hercegovino dum la lastaj 18 jaroj, estas definitive solvita. Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino kun partopreno de deko da siaj membroj kunaĉetis loĝejon en centra zono de Sarajevo (str. Kralja Tvrtka 19) kiu servos kiel kunvenejo de lokaj esperantistoj, sed samtempe kiel sidejo kaj oficejo de la Ligo.

La aĉetita ejo estas en detruita stato kaj ĝi bezonegas fundan renovigon, kiel videblas sur la apudaj fotaĵoj. La rekonstruajn laborojn oni pritaksas je 15.000 eŭroj. Tiucele la Ligo lanĉis apartan fondaĵon „NIA DOMO“ por kolekti financajn rimedojn por renovigaj laboroj kaj posta instalo de oficeja ilaro. Ĝi invitas siajn membrojn, esperantistojn kaj amikojn tra la mondo per modestaj, eĉ simbolaj kontribuoj subteni „NIAN DOMON“. La kontribuoj estas interalie pagebla al la banko-kontoj de UEA, **kodnumero elbh-j.**

Antaŭ la kontraŭbosnia agreso en 1992, bosniaj esperantistoj disponis en Sarajevo pri tri kunvenejoj, ĉiuj en centra kvartalo de la urbo – oficejo de la Ligo, kunvenejo de la loka E-societo kaj klubejo de Universitata E-klubo. Post la milito nova aŭtoritato rezignis redoni eĉ unu el la ejoj al la E-organizaĵoj. Tial la aĉetita kunvenejo estas historia evento por la bosnia E-movado, kiu ĝuste ĉi-jare en 2010 festas sian centjariĝon.

sekretariino

Vildana Delaliĉ

ELS ESPERANTISTES BOSNIANS PER AL JUBILEU EN CASA PRÒPIA

La falta d'un local de reunió propi, el problema més grau que havien d'afrontar els esperantistes de Sarajevo i més generalment de Bòsnia i Hercegovina durant aquests últims 18 anys, està definitivament solucionat. La Lliga Esperantista de Bòsnia i Hercegovina (ELBiH), gràcies a la participació d'una desena dels seus membres, va comprar un local a ple centre de Sarajevo (str. Kralja Tvrtka 19) que servirà de lloc de reunió dels esperantistes locals i serà al mateix temps la seu i el despatx de la Lliga.

El local adquirit va estar bastant danyat durant la guerra i necessita una restauració completa, com es pot apreciar en les fotos adjuntes. El valor dels treballs de reconstrucció està avaluat amb 15.000 euros. Per arribar a recollir aquest import, la Lliga ha obert un fons especial anomenat "NIA DOMO". Invita els seus membres, esperantistes i amics de tot el món, a recolzar "NIA DOMO" per contribucions encara que siguin modestes o fins i tot simbòliques. Entre altres possibilitats, les contribucions es poden pagar al compte bancari de UEA, **numero de codi: elbh-j.**

Abans de l'agressió contra el poble bosnià el 1992, els esperantistes bosnians disposaven de tres locals a Sarajevo, tots al centre de la ciutat: la seu de la Lliga, el lloc de reunió de la societat esperantista local i el club de la Universitat. Després de la guerra, les noves autoritats no van acceptar de tornar ni un local als esperantistes. Per aquesta raó, la compra del local actual representa un esdeveniment històric per al moviment esperantista bosnià, que precisament aquest any 2010 celebra els seus cent anys.

La Secretària

Vildana Delaliĉ